Therefore, the esperantists talked, in twos and threes, in larger and constantly changing groups, exchanging ideas, autographs, and cards, discussing literary or political matters as energetically as if each person were speaking his national language, and forgetting for the time that such words as "foreigner" or "stranger" exist. How many pleasant memories of that day to be recalled throughout the years, whether these international friends meet again next year at the Eighth Congress, or whether they never see each other again! One of the Americans who made good use of his opportunities at the congress, the first he had ever attended, remarked that he had the autographs of five hundred new friends because of the week in Antwerp. The others had cards and photos and autographs indicating similar friendships, and esperantists of experience testify that this is always one of the great pleasures of an Esperanto Congress.

CONGRESS FRIENDSHIPS.

In fact, the finding of friends is one of the wonderful experiences at Esperanto Congresses. While this is by no means inevitable, yet persons who have Esperanto in common can frequently find a second common interest, and what begins as almost a casual acquaintance ripens into a lasting and delightful friendship, even though the two friends live on opposite sides of the earth. As for the "esperantist international weddings," suffice it to say that they do occur, and are among the very happiest matches.

En la eksteraj kafejoj, la vicoj da seĝoj kaj tabloj apud la hoteloj, kie la plezurama Belgo, simile al la Franco, sidas por ĝui glaciaĵon, aŭ trinki kafon aŭ alian refreŝigan trinkaĵon, grupoj da esperantistoj el ĉiuj nacioj estis ĉiam videblaj.

Afiŝetoj apud la akceptejo, kovrite de proponoj pri rendevuoj por esperantistoj kiuj, korespondinte kun samideanoj alilandaj, nun deziras persone renkonti, mute sed elokvente atestis la potencon de Esperanto starigi internaciajn amike-

cojn

LA INTERNACIA BALO.

Unu el la plej agrablaj tute sociaj aferoj dum la kongresa semajno estas ciujare la internacia balo, vendredon vespere,—je la tago antaŭ la kongresa finiĝo. Dum pli fruaj tagoj, malnovaj amikecoj renoviĝis, kaj novaj multnombre fariĝis; tial la balo donas okazon por agrablega vespero, kiam esperanto per eksklusive socia uzado estas ilo por grandega plezuro. La balo de la Sepa Kongreso okazis en la somerloĝejo de la Harmonia Klubo, kies grandaj salonoj kaj belaj ĝardenoj estis tre taŭga loko por tia festo. Bonega orkestro de pli ol cent instrumentoj faris la muzikon, kaj la dancantoj dancis kun plena gajeco, dum la nombro da rigardantoj kaj promenantoj tra la ĝardenoj estis egala aŭ eble pli granda. La kutimo de antaŭaj kongresbaloj, laŭ kiu oni portas tipan veston de sia patrujo, ne estis ĝenerale sekvata; tamen kelkaj interesaj kostumoj estis vidataj. Kelkaj Skotoj portis la ceremonian kilton, kaj unuj usonanoj la "stelojn kaj striojn", kiel skarpon trans la brusto aŭ alimaniere

aranĝitajn. Eble la plej interesaj estis la tre pitoreskaj vestaĵoj de Dro. Robin el Bukarest, redaktoro de DANUBO, kaj de Sino. Robin kaj iliaj geinfanoj. Tiuj du allogaj infanoj, kvinjara knabeto kaj sepjara knabino, ŝajne tiom ĝuis la kongreson kiom plenaĝuloj, kaj impresis ĉiujn konatojn per sia mirinde facila kaj korekta uzado de Esperanto,

In the outdoor cafés, the rows of chairs and tables in front of hotels, where the pleasure-loving Belgian, like the Frenchman, sits to sip an ice or drink coffee or partake of some other refreshing beverage, groups of esperantists from all nations were always to be seen, while a bulletin board near the "Akceptejo," covered with suggestions of rendezvous for esperantists, who had corresponded with esperantists of other nations and now wished to "meet in the flesh," gave mute but eloquent testimony of the power of Esperanto in forming international friendship.

THE INTERNATIONAL BALL.

One of the pleasantest purely social events of the Congress week is always the international ball on Friday evening, the day before the Congress formally closes. By this time, old friendships have been formed, and such an occurrence as a ball furnishes opportunity for a most delightful evening, when Esperanto in purely social use is a medium offering unalloyed pleasure. The ball in connection with the Seventh Congress was held in the summer quarters of the "Harmonie Club," whose large halls and beautiful gardens formed an excellent location for such an event. A fine band of over one hundred pieces furnished the music, and the dancers danced with joyous abandon, while the number of onlookers and of those who strolled in the gardens and sat at the numerous tables for refreshments was as large or perhaps larger. The custom of wearing the typical garb of one's native country was not very generally followed on this occasion, although a few interesting costumes were noted. Several Scotchmen wore the full dress kilt, a number of Americans wore the stars and stripes in the form of a scarf across the breast, or otherwise arranged, etc. Most interesting were perhaps the elaborately picturesque Roumanian costumes of Dr. Robin of Bucharest, the editor of "Danubo," and of Mrs. Robin and their two children, a small boy and girl of about five and seven years of age, respectively, who by the way seemed to enjoy the whole congress as much as any of the grown-ups, and impressed all acquaintances with their wonderfully fluent and

kiu efektive estas al ili preskaŭ dua patra lingvo.

LA FINA KUNVENO.

La lasta ĝenerala kunsido de la kongreso okazis Sabaton matene. Kelkaj raportoj estis prezentataj, inter kiuj estis tiu de Lingva Komitato, legata de ĝia prezidanto, E. Boirac, rektoro de la Universitato de Dijon, ankaŭ raporto pri plua organizado de la Internacia Financa Konsilantaro, kreita en 1910, kaj raporto pri la oficistoj elektitaj de la Komisio antaŭe priskribita sur tiuj ĉi paĝoj,

La Kongreso voĉdonis dankojn al la reĝo kaj estraro de Belgujo, al tiuj alilandaj registaroj kaj estraroj kiuj sendis oficialajn representantojn, al lia urbestra moŝto de Londono, al la urbo Antverpeno kaj al la organiza komitato de la

Sepa Kongreso.

OKA KONGRESO.

Oni voĉdonis ke la oka internacia kongreso de Esperanto kunvenu en Krakovio, antaŭe la ĉefurbo de antikva Polujo, kaj tiamaniere solenigu en la lando de ĝia naskiĝo la dudekkvinan datrevenon de la kreado de Esperanto. Oni plue voĉdonis ke la Kongreso de 1913 okazu en Genovo, kaj de 1914 ĉe Parizo. Por la kongreso de 1915, kaj San-Francisko kaj Edinboro estis proponitaj, sed oni ne voĉdonis.

Post kiam Sro. Van der Biest-Andelhof dankis la kongresanojn pro ilia helpo en sukcesigado de la kongreso, kaj esprimis esperon ke iliaj memoroj pri Antverpeno estu kiel eble plej agrablaj, la kunsido finiĝis kiam Fino. Maria Posenaer (el la organiza komitato) prezentis al Dro. Zamenhof, pro la belga esperantistaro, pentraĵon pentritan de la belga artisto Emilo Stoffels. La temo de tiu bela pentraĵo estas la pitoreskaj dokaj de Antverpeno, ĉe kiuj montriĝas ŝipo portanta la simbolan standardon de Esperanto. Post kiam Dro. Zamenhof esprimis sian estimon de tiu notinda donaco, la esperantistaro kune kantis "La Espero" lastatempe dum la Sepa Kon-

greso, kaj poste malrapide foriris el la salono, adiaŭante amikojn tie kaj ĉi tie, correct use of Esperanto, which is practically a second mother-tongue for these attractive children.

THE CLOSING MEETING.

The last general session of the Congress took place Saturday morning. Several reports were presented, among them being that of the "Lingva Komitato," read by its president, Rector Boirac, of the University of Dijon, and the report concerning the further organization of the International Financial Council, created in 1910, and of the officers chosen for the Commission (mentioned earlier in these pages).

The Congress voted formal thanks to the king and to the Belgian government, to those foreign governments which sent official representatives, to the Lord Mayor of London, to the city of Antwerp, and to the organizing committee of the 7th

Congress.

EIGHTH CONGRESS.

It was voted that the Eighth International Esperanto Congress should be held in Cracow, once capital of ancient Poland, thus celebrating the 25th anniversary of the creation of Esperanto in the native land of the author of Esperanto. It was further voted to hold the Congress of 1913 in Genoa, and of 1914 in Paris. For 1915 both San Francisco and Edinburgh were proposed, but no vote was taken.

After Dr. Van der Biest-Andelhof had thanked the Congress members for their assistance in making the Congress a success, and expressed his hope that their memories of Antwerp would be the pleasantest possible, the session ended with the presentation to Dr. Zamenhof, by Miss Maria Posenaer, of the organizing committee, on behalf of the Belgian Esperantists, of a painting by the Belgian artist Emile Stoffels. The subject of this handsome painting was the picturesque docks of Antwerp, in the foreground of which appeared a ship bearing the symbolic flag of Esperanto. After Dr. Zamenhof had expressed his appreciation of this unique gift, the esperantists joined in singing "La Espero," for the last time during the Seventh Congress, and then moved slowly from the hall, saying farewell to friends here and there, with always the clause added by

ĉiam kun la frazero "Ĝis Krakovio", aldonita de unu aŭ la alia. Samtempe oni rapide uzis fotografilojn, por lastaj bildoj de Dro. Zamenhof, de konataj esperantistoj, de grupetoj, dum Esperantistaj standardoj flirtis je la fundo.

Postkongresaj Okazintaĵoj.

Du horojn post la fina kunveno de la ĝenerala Kongreso okazis la malferma kunveno de la Universala Esperanta Asocio, granda organizaĵo kies anaro multnombre estis reprezentata inter

la anoj de la kongreso mem.

Tiu societo, kies prezidanto estas Sro. H. B. Mudie el Londono, kaj kies malferman kunsidon ĉeestis Dro. Zamenhof, ne zorgas pri ia ajn propaganda laboro sed celas uzi esperanton en praktika vivo, kaj utiligi la servojn de esperantistoj en ĉiuj landoj por aliaj esperantistoj, en la komercaj aferoj, vojaĝado, k. t. p.

Aferoj pri la organizado kaj administrado de tiu granda kaj diversefika societo estis diskutataj, raportoj estis prezentataj, financaj faktoj estis anoncitaj, novaj fakoj starigitaj, k. t. p., La finaj kunsidoj de la Asocio okazis lundon. Detalajn raportojn pri tiuj ĉi kunvenoj oni povas legi en la monata ĵurnalo "Esperanto," kiu estas la oficiala organo de la Universala Esperanta Asocio.

ESPERANTO KAJ LA RÛGA KRUCO.

Dimanĉon matene estis prezentata alte interesa montraĵo pri la granda utileco de Esperanto por la laboroj de la Ruĝa Kruco. La malfacilaĵoj pro la manko de lingva kompreno, kiuj malhelpigis la ruĝkrucajn laborantojn en la tempo de plej granda bezono, estis imprese konigitaj dum la Rus-japana milito kaj multaj aliaj okazoj.

Pro tio, kelkaj Ruĝkrucaj administrantoj faris agemajn penojn por enmeti Esperanton kiel postulaĵon de la servo, kaj esperanta literaturo speciale taŭga por tiu uzo jam estas akirebla.

Por la Antverpena montraĵo oni aranĝis tendojn, ambulancan servon, k. t. p. en la Placo Sankta Johano, kaj kelkaj memvolaj "vunditaj soldatoj" estis pretaj por ludi tian rolon en la prezentado. Je la dekunua la kuracistoj, one or the other, "Farewell till Cracow;" while the kodaks everywhere were in good use, in getting final pictures of Dr. Zamenhof, of various well-known esperantists and of groups of friends, as Esperanto flags waved in the background.

Post-Congress Events.

Two hours after the closing meeting of the general Congress, the opening meeting was held of the U. E. A., a large and important organization whose membership was well represented among the members of the general congress.

This organization, whose president is Mr. H. B. Mudie, of London, and at whose first session Dr. Zamenhof was present, does not attempt to do any propaganda work, but seeks to make use of Esperanto in practical life, and to make the services of esperantists in all countries accessible to other esperantists in commercial dealings, travel, etc. Matters of organization and administration of this large and many-sided body were discussed, reports presented, financial records announced, new "sections" were established, etc., the final sessions of the Association being held on Monday. Detailed reports of these meetings will appear in the monthly journal, "Esperanto," which is the official organ of the U. E. A.

ESPERANTO AND THE RED CROSS.

Sunday morning a highly interesting exhibition was given of the great utility of Esperanto in the work of the Red Cross. The difficulties due to lack of linguistic intercomprehension, which are liable to render Red Cross workers helpless at times of greatest need, on the battlefield of nations of alien languages, were strikingly shown during the Russo-Japanese war, as well as on many other occasions. For this reason active efforts have been made by Red Cross workers to have Esperanto introduced as a requirement in the service, and Esperanto literature especially for such use is already obtainable.

For the Antwerp demonstration, tents, ambulances service, etc., had been arranged in the Place St. John, and a number of volunteer "wounded soldiers" were ready to play their part in the exhibition. At eleven o'clock the doctors,

helpantoj, k. t. p., aperis, direktitaj de Dro. Noel el la ruĝkruca kuracistaro ĉe Parizo, Dro. Broeckaert el Antverpeno, kaj ruĝkrucanoj el Antverpeno kaj du aliaj urboj. Tiuj pasis de unu soldato al alia, ekzamenante vundojn, ricevante petojn de la "vunditoj," donante or-

donojn, k. t. p.

Cio estis farata en Esperanto kun granda rapideco kaj akurateco, kaj la metodo por komuniki rapide kun neespperantistaj soldatoj kaj ruĝkrucistoj, kaj ankaŭ kun spertuloj de la lingvo, estis efektive montrata. La usona fako de la ruĝa kruco estis oficiale reprezentata ĉe la Kongreso de Dro. H. W. Yemans, el la Usona Kuracista Rezervarmeo.

Postkongresaj Vojaĝoj.

Post kiam la kongresa semajno finiĝis, multaj kongresanoj partoprenis diversajn interesajn postkongresajn vojaĝojn. El tiuj la du plej interesaj al amerikanoj estis la vojaĝo de la Internacia Scienca Asocio kaj la vojaĝo de la "Nordamerika Karavano." Mallongajn priskribojn pri tiuj du vojaĝoj, montrantajn la utilon de Esperanto dum vojaĝado, oni donos en la novembra numero de Amerika Esperanto.

aides, etc., appeared, directed by Dr. Noel, of the staff at Paris, Dr. Broeckaert, of Antwerp, and Red Cross members of Antwerp and two other cities. These passed from one to another of the soldiers, examining wounds, receiving requests from the "wounded," giving directions, etc., all being carried on in Esperanto with great speed and accuracy, the method of communicating quickly with non-esperantist soldiers and Red Cross workers, as well as with those proficient in the language, being effectively The United States demonstrated. branch of the Red Cross was officially represented at Antwerp by Dr. H. W. Yemans, of the U. S. Medical Reserve Corps.

POST-CONGRESS TRIPS.

After the congress week has ended, many of the congress members participated in various interesting post-congress trips. Of these the two most interesting to Americans were the trip of the International Scientific Association and the trip of the "Nordamerika Karavano." * * * Short descriptions of these two trips,, showing the benefit of Esperanto in travel, will be given in the November number of Amerika Esperanto.

La Parolado de Dro. Zamenhof

IEL tradicia malfermanto de la kongresoj esperantistaj, mi permesas al mi esprimi en la nomo de ĉiuj kongresanoj nian respektan kaj sinceran dankon al lia reĝa moŝto la reĝo Alberto pro la granda honoro, kiun li faris al nia afero, prenante sur sin la protektantecon super nia kongreso. Mi esperas, ke mi esprimos la deziron de ĉiuj kongresanoj, se mi proponos, ke ni sendu telegrafe nian diversgentan saluton al la regnestro de la lando, kies gastoj ni estas, kaj nian dankon al nia alta protektanto. Mi esprimas ankaŭ en la nomo de la kongresanoj nian koran dankon al la urbestraro de Antverpeno, kiu afable donis al ni sian helpon kaj moralan apogon. Fine mi esprimas nian koran fratan dankon al tiuj niaj belgaj sami-

deanoj, kiuj tiel laboreme kaj zorge pretigis nian grandan feston.

Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegajn meritojn en nia afero. La prelato Johann Mar-TIN SCHLEYER, kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük. antaŭ nelonge festis la okdekjaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kunestado por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankaŭ revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi; sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj senkorpaj fantomoj en la regiono de revoj. Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas

ne revi, sed labori; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan movadon. Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis per si mem en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas alkutimiĝi, kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multespeca uzado eĉ la plej sovaĝa idiomo de la plej barbara gento iom post iom fariĝas riĉa, eleganta kaj oportuna

lingvo.

Volapük pereis cefe pro unu grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: absoluta manko de natura evolucio; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus tiu eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Volapük neniam pereus kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus volapüke. Sed tiu bedaŭrinda eraro, kiun kaŭzis ne manko de talento kaj de laboremeco, sed nur tro rapida publikigo de la lingvo, sen sufice matura elprovado, -tiu eraro, kiu pereigis Volapükon, neniel malgrandigas la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potence skuis la mondon por nia ideo; la grandaj meritoj de Schleyer en la internacilingva historio neniam malaperos.

Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.

Karaj amikoj! Mi staras hodiaŭ antaŭ vi ne esperinte. Ĉar dum la lasta tempo la stato de mia sano estis tro malbona, mi decidis ne veturi al la kongreso en ĉi tiu jaro. Tamen en la lasta momento mi devis ŝanĝi mian decidon, ĉar mi rimarkis, ke la projekto, kiun mi prezentis por diskutado dum la sepa kongreso, ne de ĉiuj estas ĝuste komprenita kaj eble bezonos klarigojn de mia flanko. Tial

ne miru, ke mi ne prepariĝis paroli antaŭ vi pri ia speciala temo, sed mi tuŝos nur per nemultaj vortoj tiun demandon, kies pridiskutadon dum la kongreso mi proponis al vi. Mi ne antaŭvenos vian decidon por aŭ kontraŭ la diskutota projekto, mi volas nur diri kelkajn ĝeneralajn vortojn, por instigi vin bone kaj senpartie prepariĝi por la venontaj

diskutoj.

Ekzistas en nia afero demandoj, kiuj povas esti solvataj ne de iu aparta persono, ne de iu aparta nacia asocio, ne de iu aparta institucio, sed nur de la tuta esperantistaro; ekzemple la demandoj pri nia Lingva Komitato, Konstanta Kongresa Komitato, k. t. p. Se iu volas fari simple konsilajn proponojn pri la interna agado de tiuj institucioj, li povas prezenti siajn proponojn al la estroj de la diritaj institucioj; sed se oni faras plendojn, se oni postulas reorganizon, anstataŭigon aŭ eĉ forigon de tiuj institucioj,—tiam al kiu oni devas sin turni? Aŭ se aperas iaj demandoj, kiuj koncernas la tutan esperantistaron, sed apartenas nek al la Lingva Komitato, nek al la Komitato de la Kongresoj,-tiam kiu havas la rajton ilin solvi? En sia privata esperantista vivo ĉiu persono aŭ grupo aŭ asocio estas kompreneble tute liberaj kaj povas agi, kiel ili volas kaj povoscias; sed pri čiuj demandoj, duboj aŭ entreprenoj, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, estas nepre necese, ke ni havu la eblon ĉiam scii la veran opinion aŭ deziron de la tuta esperantistaro. Esperanto ne estas ankoraŭ en tia feliĉa stato, ke ĉiu povu nur tiri el ĝi profiton, ne zorgante pri la bonstato de la afero mem: ni devas kaj dum longa tempo ankoraŭ devos propagandi ĝin, kreskigi ĝin, defendi ĝin kontraŭ malamikoj; sed se ni ne havas la eblon regule interkonsiliĝadi, aŭ se niaj interkonsiliĝoj, farataj ne en orda parlamenta maniero, ne havos moralan valoron por la esperantistoj, ni similos organismon sen kapo kaj sen manoj, ni nenion povos entrepreni, ni staros senmove kaj malpacos inter ni mem.

Mi ne volas en la nuna momento defendi la projekton, pri kiu vi en la plej proksimaj tagoj diskutos; tre povas esti, ke la projekto havas gravajn erarojn, kiujn via pridiskutado forigos; tre povas esti, ke la tuta projekto montriĝos neak—mi ne penos altrudi ĝin al vi, kiel mi neniam ion al vi altrudis. Nur pri unu afero mi kore vin petas: kion ajn vi decidos,—ni ne fermu nian kongreson antaŭ ol ni en tia aŭ alia formo faros ian aranĝon, kiu donos al ni la eblon almenaŭ unu fojon en jaro solvi ĉiujn kolektiĝintajn disputojn aŭ dubojn en lojala interkonsento kaj konforme al la vera deziro de la tuta esperantistaro.

La aranĝo de regula kaj rajtigita kongresa voĉdonado, kiun mi proponis al vi, aŭ ia alia simila aranĝo, kiu eble rezultos el via diskutado, ne estos ia nova institucio kaj per si mem ne ŝanĝos la iradon de nia afero; sed ĝi donos al ni la forton de ordo kaj de solidareco. La institucioj, kiujn ni kreis, aŭ eble ankoraŭ kreos, ĉesos havi la karakteron de ia privataĵo kiun neniu subtenas kaj multaj atakas. Ili havos rajton diri al la esperantistaro: se ni estas bonaj, respektu

nin kaj subtenu nin; se ni estas malbonaj, reorganizu nin aŭ forigu nin. Ĉiu esperantisto scios, al kiu plej alta instanco li devas sin turni, se tio aŭ alia en la komun-esperantistaj aferoj ne plaĉas al li, kaj oni ĉesos konstante sin turnadi al mi, kiu hodiaŭ vivas, morgaŭ povas ne vivi, kaj kiu cetere havas nek rajton nek deziron solvi ĉiujn disputojn propradecide.

Ni komencu nian feston kaj ankaŭ niajn laborojn, al kiuj ni dediĉu nian plenan atenton kaj senpartiecon. Se el niaj laboroj rezultos la enkonduko de preciza ordo en nian aferon, tiam la kongreso Antverpena estos unu el la plej gravaj inter niaj kongresoj. Tion ni esperu. Ĉiu el ni havu la firman decidon helpi per ĉiuj fortoj al la enkonduko de ordo kaj forigo de ĉiu malpaco en nia afero. Kun tiu firma kaj solena decido en la koro ni kriu: vivu, kresku kaj floru nia afero!

Aldono al la Regularo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto

perantista Kongreso estas deviga nur por la komunaj Esperantistaj Institucioj oficialaj, tio estas por tiuj, kiuj estas kreitaj kaj subtenataj laŭ la deziro de Internaciaj Esperantistaj Kongresoj aŭ de la decido de la Delegitaro Rajtigita. Por la Esperantistoj privataj ĝi havas valoron nur moralan, montrante al ili la deziron aŭ opinion de la plimulto.

Partopreni en la Kongreso kaj en ĝiaj diskutoj havas la rajon ĉiu, kiu pagis la kotizon kaj submetiĝas al la kongresa Regularo; sed rajton de voĉdonado havas nur la regule elektitaj delegitoj de Esperantistaj grupoj aŭ societoj.

Kiel delegito estas rigardata ĉiu persono, kiu prezentas al la Kongresa Komitato rajtigan leteron, kiun, en la nomo de la grupo aŭ societo, subskribis ĝia prezidanto donante samtempe la nombron de anoj de la grupo aŭ societo.

Ciu loka, regiona kaj landa grupo aŭ societo povas elekti po unu delegito por dudek kvin anoj. Malgrandaj grupoj povas, por elekto de delegito, kunigi kun aliaj grupoj.

Ciu grupo povas elekti siajn delegitojn aŭ inter siaj propraj membroj, aŭ inter aliaj esperantistoj, kiuj partoprenos en la Kongreso. Ĉiu delegito havas tiom da voĉoj, kiomfoje po 25 anoj havas la grupoj aŭ societoj, kiujn li reprezentas.

La tagordon de la Kongreso fiksas la Prezidanto de la Konstanta Kongresa Komitato post interkonsiliĝo kun la aliaj anoj de tiu komitato, kaj li publikigas ĝin tri monatojn antaŭ la Kongreso en la Oficiala Gazeto, por ke ĉiuj societoj kaj grupoj havu eblon esprimi al siaj delegitoj sian opinion pri la diskutotaj demandoj.

Se ia propono ne estas akceptita en la tagordo, ĝia aŭtoro povas ricevi de la Kongresa Estraro rajton disdoni ĝin dum la Kongreso, kaj se ne malpli ol 100 delegitoj subskribas ĝin kiel diskutindan, la Kongresa Komitato devas enporti ĝin en la tagordon.

En ĉiu grupo aŭ societo estas konsiderata kiel elektanta membro de grupo aŭ societo ĉiu, kiu pagis jaran kotizon al la Administra Komisio.

Some Congress Facts

Official Delegates.

The following governments and nonesperanto organizations sent official delegates to the Seventh Esperanto Congress in Antwerp:

Belgium, represented by Mr. Goemans, general inspector of intermediate instruc-

tion.

Brazil, Agenor Augusto de Miranda, engineer of telegraphs.

Chile, Dr. Fraga.

Guatemala, Mr. Marsily, consul at

Antwerp.

China, Koey Ping Young, secretary of the Chinese legation in Brussels.

Spain, Captain Josefo Perogordo. Hungary, Aleksandro Giesswein. Nicaragua, consul at Antwerp. Norway, Linar Schibbye.

Persia (name not obtained).

Rumania, the Ministry of Agriculture and Real Estate, reepresented by Mr. Fischer, who also represented the Chambers of Commerce of Bukarest and Galatza.

Russia, the Ministry of Commerce and

Industry, by Mr. Nedaviŝin.

United States of America, Mr. Edwin C. Reed, who also represented the Washington Chamber of Commerce.

War Department, U. S. A., Dr. H. W. Yemans, who also represented the Ameri-

can Red Cross Society.

Bureau of Standards, Dept. of Commerce and Labor, U. S. A., Mr. E. C. McKelvy.

State of Massachusetts, Mr. Winthrop

Lee.

State of North Carolina, Dr. Abraham

Rudy.

State of Pennsylvania (by special act of the legislature), Mr. J. D. Hailman.

State of Vermont, Mr. John L. Stan-

yan.

City Government of Praha, Austria, Jan Biskup, city councilor.

International Institute of Bibliography,

Mr. Paul Otlet.

Touring Club of France, Mr. Gabriel. French Society of Arbitration among Nations, Mr. Ch. Richet.

International Association of Peace and Arbitration (London), Mr. F. Moscheles.

AMERICANS AT THE CONGRESS.

The following is a partial list of those from North America present at the Congress in Antwerp. It was reported that forty-two members of the Esperanto Association of North America were registered, some of them registering during the last few days and therefore not included in the published list of congress members. The following were known to be present:

Edwin C. Reed, official representative of the United States of America (also representing the Washington Cham-

ber of Commerce).

Dr. H. W. Yemans, official representative of the U. S. War Department, also

of the Red Cross Society.

E. C. McKelvy, official representative of the U. S. Bureau of Standards (Department of Commerce and Labor).

J. D. Hailman, representing the State of Pennsylvania (by legislative enact-

ment).

G. W. Lee, with credentials from the Governor of Massachusetts.

J. L. Stanyan, with credentials from the Governor of Vermont.

Abraham Rudy, with credentials from the Governor of North Carolina.

Dr. Ivy Kellerman-Reed, Editor of Amerika Esperantisto.

H. S. Hall, Councilor of the Ohio Valley Division, Esperanto Association of North America.

J. M. Geldert, Councilor of the Canadian Division, Esperanto Association of

North America.

J. F. Morton, Jr., Councilor of the New York Division, Esperanto Association of North America.

Herbert Harris, Portland, Me. Dr. D. W. Fellows, Portland, Me. Miss Julia May Leach, Amherst, Mass. Dr. John Groman, Utica, N. Y.

Miss Cora L. Butler, Port Richmond,

N. Y.

Albert Janssen, Brooklyn, N. Y. Miss Janssen, Brooklyn, N. Y. Jos. Silbernik, New York, N. Y.

Miss L. F. Stoeppler, New York, N. Y.

Dr. H. B. Besemer, Ithaca, N. Y. Mrs. H. B. Besemer, Ithaca, N. Y. John D. Collins, Ithaca, N. Y.

Miss Delia C. Condron, Washington,

D. C.

Clifton R. Linfoot, Washington, D. C. Dr. W. J. R. Thonssen, Washington, D. C.

Miss Belle C. Saunders, Washington, D. C.

Miss Julia H. Hoffman, Washington, D. C.

Miss E. W. Weems, Baltimore, Md. Mrs. A. Rudy, Raleigh, N. C. Miss Ann E. Beattie, Cardington, O. Mrs. H. W. Yemans, Detroit, Mich. Dr. B. F. Simonek, Chicago, Ill. Mrs. B. F. Simoneek, Chicago, Ill. Edwin L. Clarke, Canon City, Col. D. E. Parrish, Los. Angeles, Calif. H. I. Keyes, Uniontown, Pa.

ITEMS.

At the time of opening of the Congress there were 1722 members enrolled. Even until the last days of the convention others enrolled, and while the exact figures of the final enrollment are not at hand, it is safe to state that the membership was considerably over 1800.

At the opening meeting the speakers representing the Esperantists of different nations and languages numbered thirty-

two.

The Konstanta Komitato de la Kongresoj for the coming year was chosen as follows:

Honorary Presidents: Dr. Zamenhof and Prof. Boirac.

President: General Sebert of Paris. Vice President: Prof. Carlo Bourlet of Paris.

General Secretary: Gabriel Chavet of Paris.

Curators of the Congress Treasury: Dr. Mybs of Dresden and Mr. Mudie of London.

Other Members: Dr. Yemans and Edwin C. Reed of United States, and Messrs. Van der Biest and Van Schoor

of Belgium.

As told in the story of the Congress, it was decided to create a Commission to bring in a plan for a general world federation. This Commission has appointed a sub-commission to classify all suggestions, and all suggestions must be sent to this sub-commission in Germany before December first. The American member of the general commission is Edwin C. Reed, who will be glad to receive and forward any suggestions.

CINEMATOGRAPH PICTURES.

One of the up-to-date moving picture theatres of Antwerp took photographs of the opening meeting of the Congress, also of other interesting occurrences, and displayed these to interested audiences of Esperantists and the general public during the Congress week. After that week the films were obtainable for general use, and the firm owning them (Pathé Bros.) are now showing the pictures everywhere. Americans should urge their best local moving picture theatres to obtain and use these films of the Seventh Congress, thus accomplishing the double purpose of seeing for themselves a few of the events of the Congress, and carrying out a new line of propaganda work. (A film costs \$5.00 and may be obtained at 41 West 25th St., N. Y.)

Concurrent Resolution

(This resolution passed by the Pennsylvania Legislature, in accordance with which Mr. J. D. Hailman of Pittsburgh, represented his state at the Esperanto Congress in Antwerp, should be carefully read by all who are planning legislative work concerning Esperanto during the coming year.)



HEREAS, The famous international language, Esperanto, intended to facilitate communication between people and races speaking dif-

ferent tongues, has been and is making vast strides throughout the world; and

Whereas, The Seventh International Congress of Esperantists will meet in Antwerp, Belgium, in August, one thousand nine hundred and eleven; and

Whereas, The students and adherents of this language are working to bring about universal peace and a closer union among the races of the world; and

Whereas, Official representatives from many nations have attended these Congresses and will attend the coming one

in Antwerp; and

Whereas, The United States Government has been and will be represented

officially at these Congresses; and

Whereas, It is fitting that the Commonwealth of Pennsylvania should be officially represented at the Seventh Con gress; therefore

Be it resolved by the Senate of the General Assembly of the Commonwealth of Pennsylvania (if the House of Representatives concur), that the Governor is hereby authorized and directed to appoint one male citizen of this Commonwealth, skilled in Esperanto, to represent this Commonwealth at the Seventh International Congress of Esperantists, to be held in the city of Antwerp, Belgium, in August, one thousand nine hundred and eleven. Such representative shall serve without compensation from or expense of any nature to this Commonwealth.

To Non-Esperantists

SPERANTO, whose Seventh Annual International Congress has been described in this number of AMERIKA ESPERANTISTO, is by no means an untried experiment. Although only seven annual meetings have been held, the language was first published twenty-four years ago, in a brochure by Dr. Zamenhof of Warsaw, and since that day has steadily gained ground, until it is now fairly well established in every country of the world, and is definitely established in the chief countries of Europe. In this number of the magazine we have told some of the things done all in the one international auxiliary language, in a great meeting of delegates from thirty-two different countries and languages. In the next number we shall tell how advantageous it is to know Esperanto when traveling in foreign lands.

Esperanto is not intended to supplant any existing language. It is not a project for the establishment of a universal tongue, but it meant to fill that great desire for an international idiom, a language which all nations will learn after the mother-tongue, instead of merely obtaining a smattering of some one or more difficult foreign national languages which can be of benefit only in the one or more countries where such language is spoken.

Esperanto is many times easier to ac-

quire than is any national language. It is free from the difficult idioms which trouble the student; it is regular; and there are no exceptions to any of the few rules; it is pronounced exactly as it is spelled, for each letter always has the same sound, and each sound is always represented by the same letter; it has one easy conjugation for all verbs, so there are no irregular verbs.

Esperanto not only is intended for a medium of easy international communication for the man of commerce or science, or for the traveler, but its propagandists also believe that Esperanto has a mission even more important. Esperantists in all countries are making friends in other lands, for even though they may not travel it is a simple matter to obtain the addresses of esperantists in other parts of the world who have mutual interests. As Esperanto progresses and more and more people thus become acquainted with others in the far corners of the world, and learn that they also are truly "human," the contempt for the "foreigner" will become less and the spirit of international good-will is obviously bound to increase.

We therefore invite you who are not yet Esperantists to become members of this great world movement. Obtain a text-book and see how interesting the study is. Join The Esperanto Associ-ATION OF NORTH AMERICA, whose membership is open to any person interested in the movement. Subscribe for Ameri-KA Esperantisto which, in its regular numbers, contains news of the movement among the societies of this and other countries, a considerable amount of good literature in Esperanto for both the student and the proficient Esperantist, as well as a special department for beginners. Year's subscription is \$1.00, with which we will give to new subscribers for a limited time, a free paper-covered copy of the the American Esperanto Book. Active membership in The Esperanto Association of North America is fifty cents a year.

To Esperantists

ITH the first of October a new year of activity begins. The importance of Esperanto here and abroad has been steadily increasing, thanks to the work you have been doing. The coming year is certain to be a most important one, a year in which, by pulling together for our common cause, much may be accomplished to establish more firmly the international language in the minds of the American people. First and foremost be sure to keep your name on the list of subscribers of the magazine and thus keep in touch with what others are doing, and at the same time assist to keep it alive and make it grow; for without such a magazine in America which you may point out to inquirers, Esperanto would not appear so strong as it is; patronize the book department of the American Esperantist Company in order that this, the one Esperanto publishing company in the country, may increase, and do more and more advertising and pushing of Esperanto publications; remember that any movement is reckoned, not at the estimated number of adherents, but by the actual enrolled membership of the official organization; therefore be sure to join or renew your membership in The Esperanto Asso-CIATION OF NORTH AMERICA. This is tremendously important this year because of the bill which has been introduced in the United States House of Representatives for an investigation of Esperanto. It is expected that this bill will come up for consideration in December, and the number of Esperantists

enrolled in the organization will have great weight. If you have not already done so, write your Congressman, asking him to consider carefully "House Resolution 220." Even if you have written once, write him again reminding him of this, about the first of December. Try to get publicity in your local papers. Take material from this number of Amerika Esperantisto, mention the resolution before Congress and any other facts of general interest and send to the editor, being sure to tell the readers that free literature about Esperanto will be mailed upon application to THE ESPERANTO OFFICE, Washington, D. C., if name, address and stamp for reply are sent.

When you are subscribing or renewing your subscription to any of the various magazines of the country, as "Saturday Evening Post," "Everybody's," etc., be sure to send these subscriptions through The Esperanto Office.. If you are subscribing for several, we can make you the best club prices, and the commissions will add a few dollars to the treasury, yet cost you nothing.

Because of the crowded condition of this number, due to the story of the Congress, the usual departments have been omitted, but the November number will contain the regular news, literary, beginner's and official departments.

Renew your subscription, renew your membership and do everything in your power to bring more members into the movement. The success of the movement ment depends upon the individual Member.

Digitized by Google